

**Provenca
Esperanto-Federacio
kvaronjara gazeto
143
vintro 2025**



Leĝa depono ĉe BNF
ISSN 2609-5203

Federacia retejo
provenco.esperanto-france.org

Prezidanto
Rosy Inaudi - 06 18 35 18 40
r.inaudi@free.fr

Aliĝkotizo (kun la gazeto) : 10€

> ĉeko al : **Esperanto-Provence**
pere de via loka asocio
aŭ sendota al la kasisto

Marc Gallardo
Les Hespérides II Bât. B2
67 bd des Alpes- 13012 Marseille
gallardomarc@gmail.com

06 09 89 09 14

> aŭ bankĝiro

(bankinformoj sendotaj laŭpete)

Por Esperanto-Marseille la kotizo
devas esti pagita al Esperanto-France
<https://esperanto-france.org>

Redaktoro

Pascal Panarotto - 06 26 34 30 93
ilarione13@outlook.fr

Grafikistino

Mh Bertucceli
mhbortucceli@gmail.com

**Limdato por sendo de
publikotaĵoj por la venonta n°**

15-a de marto 2026

bonvolu sendi al la supra retadreso

★ ★ ★

antaŭdankojn pro viaj kontribuadoj

Novjaraj Bondeziroj 2026 sub la signo de paco kaj de espero

Je la komenco de ĉi tiu nova jaro, mi volas
adresi al vi ĉiujn, la plej sincerajn bonde-
zirojn: por sano, solidareco kaj konfido en
la estonteco.

La jaro, kiun ni lasas malantaŭ ni, reme-
morigis nin, ke paco neniam estas akirita
por ĉiam.

En multaj regionoj de la mondo, militoj,
perforto kaj malfido inter popoloj daŭre
semas suferon kaj malstabilecon. En tia
kunteksto, valoroj portataj de Esperanto
sonas pli aktualaj ol iam ajn .

Esperanto ne estas nur lingvo; ĝi estas
projekto de paco.

En ĉi tiu nova jaro, ni elektu kulturi tion,
kio kunigas nin: respekton, aŭskultadon
kaj la deziron konstrui pontojn inter ho-
moj kaj kulturoj. Ĉiu ago de dialogo, eĉ
modesta, estas semo de paco.

Ke 2026 estu jaro de engaĝiĝo por pli ju-
sta, pli paca kaj pli homa mondo.

Bonan novan jaron al vi ĉiuj.

Rosy Inaudi

Prezidantino de Esperanto Provence

Fokuso

Mi legas, regule, « almanach VERMOT », (gazeto kalendaro kun ĉiuj tagaj informoj pri kulturo).

Ĉijare, ĝi babilis pri la humanistoj en la Historio : Montaigne, Leonard de Vinci... Nu! Surprizo!

Ĝi parolis rilate al Ange Politien, Nicolas de Cues, humanistoj tre famaj? Sed mi ne trovis Louis Lazare ZAMENHOF.

Do, mi decidis sendi retmesaĝon al VERMOT (webpratique@hachette-livre.fr) por proponi paroli pri li en estontaj gazetoj.

Ĉi tio helpas prezenti Esperanton kaj esperantistojn, tiujn, kiuj vi estas, tiujn, kiuj ni estas.

Bonan jaron 2026

Enhavo

3	Fête Zamenhof au Cira - Marseille
4-5	Un arbre espéranto aux Pennes Mirabeau
6	Foiro Genepi - Embrun
7	Prelego pri Esperanto kaj koncerto de Jomo - Correns
8	Celebrado de Zamenhof - Saint-Raphaël
9	Kastelo Greziljono
10	Muzeo de Gray
11	A chacun sa boule
12	Fratoj Lumière en Tours
13	Un stage studieux et convivial à La Garde
14	Les espérantistes naturistes se distinguent
15	Koruso Interkant / L'exposition : Eurasie en vélo
16-17	Guide (presque) sérieux de survie pour débutants espérantistes
18	Facila krucvortenigmo
19	Recepto
20	Agendo



Fête Zamenhof au CIRA

Renée Triolle

L'initiateur de l'espéranto, Louis-Lazare Zamenhof est né le 15 décembre 1859 ; depuis les espérantistes lui rendent hommage, comme à Marseille le 16 décembre lors d'une soirée amicale qui réunissait les espérantistes, dont Léopold venu de Martigues ! Apéritif dinatoire, jeux et échanges ont animé cette soirée. Face à ce que nous appelons aujourd'hui le communautarisme où Polonais, Russes, Litوانيens, Allemands, Juifs cohabitent tant bien que mal le jeune Zamenhof déclare «Kiam la popoloj povos libere sin kompreni, tiam ili ĉesos reciproke sin malami» («Quand les peuples pourront librement se comprendre, ils cesseront de se détester»). En fait, une langue commune, neutre, qui reconnaît toutes les langues, quel que soit leur statut, où il n'y a pas de nation forte et dominante, pas de privilégiés doit conduire à un monde en pleine harmonie.

Son idée, placer la notion d'homme au dessus de celle de peuple, race, classe, religion, préfigure la Déclaration Universelle des Droits de l'homme établie à l'ONU le 10 dé-

cembre 1948. Cette langue doit être un pont entre les cultures et permettre aux masses de communiquer entre elles sans le truchement des élites ce qui implique la démocratisation de la culture et de la communication. Ce grand humaniste est aussi un grand pacifiste qui écrit aux diplomates en 1917. §4 «pour toutes les injustices commises dans un pays, le gouvernement de ce pays est responsable devant un Tribunal Permanent Européen, mis en place avec l'accord de tous les pays européens». Il anticipe ce qui sera La Cour Européenne des Droits de l'Homme.

«Messieurs les Diplomates, souvenez-vous que le seul moyen d'atteindre une bonne paix est d'éliminer pour toujours la principale cause des guerres, /.../ la domination de certains peuples sur d'autres peuples». Ce qui sera repris par l'UNESCO : «puisque les guerres naissent dans l'esprit des hommes, c'est dans l'esprit des hommes qu'il faut cultiver les racines de la paix»

C'est ce que les espérantistes, dans la mesure de leurs faibles moyens, tentent de faire vivre au quotidien.

Un arbre Espéranto aux Pennes-Mirabeau

Rosy Inaudi

Mesdames et Messieurs,
Monsieur le Maire, Chers amis,
C'est avec joie et beaucoup d'émotion que nous sommes réunis aujourd'hui pour un geste à la fois simple, écologique, un peu poétique et profondément symbolique : la plantation d'un arbre pour la paix et l'amitié entre les peuples.

Cette cérémonie s'inscrit dans le cadre de l'« Opération Trillons d'arbres verts » des nations unies, à laquelle l'association « Espéranto Provence » s'est associée, avec la ville des Pennes Mirabeau. Une initiative qui nous rappelle que la protection de la nature et la construction de la paix sont indissociables, parce que, prendre soin de la Terre, c'est prendre soin de l'humanité. Chaque arbre planté est un pas de plus vers un équilibre entre l'homme et son environnement, entre les peuples et leur avenir commun.

Parce que, planter un arbre, c'est bien plus que mettre une graine en terre. C'est un acte de foi en l'avenir. Un arbre, c'est la vie qui se renouvelle, qui grandit, qui résiste aux

tempêtes et qui offre son ombre et ses fruits aux générations futures. En plantant cet arbre aujourd'hui, nous semons une graine de paix, de dialogue et de respect mutuel.

Cet arbre sera le témoin silencieux de notre engagement commun pour un monde où les frontières ne sont pas des murs, mais des ponts. Un monde où la diversité des cultures, des religions et des langues n'est pas une source de division, mais une richesse à célébrer.

En tant que présidente d'Espéranto Provence, je ne peux m'empêcher de souligner le lien profond entre cet acte et la mission de notre association. L'espéranto, langue internationale neutre et facile à apprendre, est un outil au service de la compréhension mutuelle. Elle incarne l'idée que le dialogue est possible, que les malentendus peuvent être surmontés, et que chaque être humain mérite d'être entendu dans sa langue et sa culture.

L'espéranto n'est pas seulement une langue, c'est un projet humaniste : celui d'un monde où chacun peut

s'exprimer sur un pied d'égalité, sans que la barrière linguistique ne soit un obstacle à la fraternité. En plantant cet arbre, nous rappelons que la paix se construit aussi par les mots, par l'écoute, et par le respect de l'autre. Cette initiative revêt une importance particulière pour Les Pennes-Mirabeau, puisque cet arbre marque son entrée dans l'annuaire des lieux accueillant un ZEO (Zamenhof-Esperanto-Objekto), qui désigne tout élément baptisé du nom de l'espéranto ou de son initiateur, Louis-Lazare Zamenhof.

Je remercie très chaleureusement M le Maire pour son accueil, son soutien... et sa confiance.... parce que planter un arbre avec des espérantistes, c'est un peu risqué : ils pourraient bien vouloir lui apprendre à dire "Saluton !" à chaque fois qu'il sort une feuille.

Merci aussi à tous les membres d'Espéranto Provence qui ont rendu cet événement possible, et merci à vous, chers participants, d'être là pour porter cet espoir avec nous.

Que cet arbre grandisse en même temps que notre détermination à faire de la paix et de l'amitié une réalité quotidienne. Qu'il soit le sym-

bole vivant de notre engagement pour un monde où chaque être humain, quelle que soit sa langue, son origine ou sa religion, trouve sa place.

Alors, oui, que cet arbre grandisse avec nous, qu'il nous rappelle chaque jour que la paix et l'amitié ne sont pas des utopies, mais des choix que nous faisons ensemble.

Et surtout, qu'il nous inspire à cultiver ces valeurs, comme on cultive un jardin. Et si jamais cet arbre parle un jour, j'espère qu'il le fera en espéranto...

Je vous remercie encore tous d'être là aujourd'hui, et après la plantation, nous vous invitons à partager un moment convivial. Parce que la paix, l'amitié et la fraternité ne se décrètent pas, elles se vivent.

Dankon al ĉiuj, kaj vivu Esperanto, vivu paco, vivu les Pennes-Mirabeau kaj longan vivon al nia plurlingva arbo!

Merci à tous, et vive l'espéranto, vive la paix, vive les Pennes-Mirabeau et longue vie à notre arbre polyglotte !

Et maintenant, à vos pelles... ou plutôt, à vos sourires, car c'est ça, le vrai ciment de notre action !

Embrun 2025 - Foiro Genepi

Monique Arnaud

Por tiu alloga Foiro Genepi 3 esperantistinoj zorgis pri la budo ĉiam en la sama loko sub la pinarboj, kiel kutime Marie-Sylvie zorgis pri la ludoj kaj sukcesis ludigi kaj infanojn kaj plenkreskulojn!



Ni estis bonŝancaj sabate matene, Marjolaine, filino de Fransoaza Noireau - Instruistino de la Jaro 2025- vizitis nin. Alia surprizo, venis al nia budo fluparolanta esperantisto kiu nur interesiĝis pri la aĉetado de la libro «la eta princo», pagis kaj malaperis! strange ĉu ne? kutime esperantistoĵ estas babilemaj.

Pluvo devigis nin ĉesi la prezentadon sabate posttagmeze, helpemaj najbaroj konsentis ke ni lasu la materialon en ilia ŝirmita loko.

Dimanĉe, kiel kutime... aŭ homoj miras, ke daŭre pludivas la universala lingvo aŭ malkovras ĝin.

Tamen, emocia momento lastminute, vizitis nian budon viro kiu laboris en la sama entrepreno kiel José Grammatico-CEA Cadarache. Mi devis anonci al li la forpason de José, ni interŝanĝis kelkajn memoraĵojn.

Pro donaco de la grupo de Manosko, nia grupo de Esperanto-05 ricevis belan panelon por indiki nian budon, Jen la vivo!



Prelego pri Esperanto kaj koncerto de Jomo en Correns (83)

Frédéric Gilles

La 26an de oktobro 2025, okazis prelego pri Esperanto kaj koncerto en la vilaĝo Correns.

Ĉirkaŭ 80 homoj ĉeestis.

La tago estis malfermita por ĉiuj, esperantistoj kaj ne-esperantistoj, eĉ se estis plimulto da esperantistoj.

Prelego pri Esperanto



La preleginto estis Jean-François Cousineau de Draguignan. La prelego estis en la franca. Li parolis pri sia propra sperto de Esperanto kaj pri la historio de Esperanto.

Li klarigis la ĉefajn regulojn kun ekzemploj. Finfine, li parolis pri la estonteco de Esperanto.

Patrick Lagrange, denaskulo (persono kies denaska lingvo estas Esperanto) parolis pri la lingvo kaj pri sia vivo. Li estas trilingva: li



havas denaskan lingvon (Esperanto), patran lingvon (la franca) kaj patrinan lingvon (la germana) ĉar liaj gepatroj konatiĝis dank'al Esperanto.

Tagmangô

Ni tagmangis bonan kuskuson, servitan de la kultura asocio de Correns.



Koncerto de Jomo

Posttagmeze, ni spektis koncerton de Jomo. Jomo estas franca kantisto kaj muzikisto, (Jean-Marc laŭ vera nomo). Li loĝas en Tuluzo, kaj kuintimas koncerti en multaj landoj. Li eĉ estas enskribita en la Guinness libro de rekordoj ĉar li kantas en 22 lingvoj.



Oficiala raporto pri la celebrado de Profesoro Zamenhof je la 13-a de decembro 2025, kiun mi havis la plezuron ĉeesti kiel gasto.

Angelina el Svislando

Saluton karaj esperantaj amikoj el tia bela parto de la mondo.

Ni renkontiĝis ĉe la strato Zamenhof je la 11:30 a.m. en la ĉarma urbo Saint-Raphaël ĉe la Franca Marbordo. La marborda restoracio «La Renaissance» estis bonega elekto, ne nur pro sia kuirarto sed ankaŭ pro sia simbola signifo: la renaskiĝo en niaj memoroj de la kreinto, kiu atingis sian celon: Unuigi la homaron kaj tiel pavumi la vojon al kompreno de diferencoj per komuna lingvo... Esperanto.

La varma bonvenigo de la 24 partoprenantoj, ilia scivolemo kaj atento unu al la alia, estis tia, ke kelkfoje,

pardonu nin Profesoro Zamenhof, ni iom krokodilis.

Post la manĝo, la establaĵo permesis al ni daŭrigi la amuzajn kaj edukajn agadojn en Esperanto. Ludado kun bazaj vortoj per interŝanĝo de litero, aldonado de prefikso aŭ sufikso, permesis al ni amuziĝi, surprizi nin mem (kiel estis la kazo por mi), kaj profundigi nian komprenon pri lingvo konstruita simple kaj logike.

Dankon al ĉiuj pro partopreno en honorado de la spirito de la Kreinto kaj kunhavigo de la valoroj, kiuj unuigas nin ĉiujn.

Speciala danko al la organizantoj de la festo.

Mi dankas scii, ke mi estas en WhatsApp en via grupo kaj ke ni eble havos kelkajn ŝancojn babili en Esperanto kaj praktiki nian 'babili'.

Feliĉajn festojn kaj ĝis baldaŭ.





Kulturdomo de Esperanto Kastelo Greziljono



Kara amikino, kara amiko.

La decembraj festoj estas bona okazo por aliĝi al Esperanto-even-to en la fama esperantista kastelo Greziljono en Baugé-en-Anjou en okcidenta Francujo! Faru al vi tiun donacon julan/kristnaskan.

La studperiodo **Printempas** okazos de **la 17-a ĝis la 26-a de aprilo 2026**, ĝi inkluzivos **Esperanto-kursojn** en kvar niveloj, ekzamenojn, distran-edukan programon kaj ekskursetojn. La kursojn gvidos niaj spertaj instruistoj: Marion Quenut el Tuluzo, KÓRÓDY Zsófia kaj Birke Dockhorn el Germanujo, Paweł Fischer-Kotowski el Nederlando. Detalojn legu en gresillon.org/p aŭ skribu al ni retmesaĝon.

La **Multaktivec-tagoj** okazos de **la 26-a de aprilo ĝis la 2a de majo 2026**, ili inkluzivos **biciklajn promenojn** kun BEMI (Eddy van den Bosch), ĥoran (korusan) **kantadon** kun Interkant (Bernard Bigonnet), praktikadon de Esperanto kaj **Biblio** kun Benoît Ente kaj pliajn programerojn.

Detalojn legu en <http://gresillon.org/rubrique17>
aŭ skribu al ni retmesaĝon.
kastelo@gresillon.org

Vi povas aliĝi diversmaniere:

- Aliĝi per reta formularo
- Printi kaj sendi paperan aliĝilon
- Sendi retmesaĝon
- Telefoni al **+33-6.51.24.24.23**

Muzeo de Gray

Paulette Chiarisoli



Dum nia feriado, ni decidis iri al Gray.

Tie, ni malkovris la straton de D-ro Zamenhof.

Poste, ni vizitis la Nacian Esperantan Muzeon.

Ĝi estas vera trezorejo de informoj pri Esperanto. Michele varme bonvenigis nin kaj klarigis, ke ŝia patro fondis la muzeon. Ŝi estas tiu, kiu nun organizas, katalogas kaj ciferecigas ĉiujn dokumentojn.

Ĝi estas plurĉambra apartamento plena je mirindaĵoj rila-

taj al Esperanto: libroj, revuoj, kunvenprotokoloj, diversaj objektoj, flagoj, bustoj de D-ro Zamenhof en diversaj grandecoj, kongresaj afiŝoj, kaj eĉ forno kun la nomo Esperanto.

Se vi estas en la regiono, ne hezitu viziti ĉi tiun mirindan muzeon.

Ni pasigis du horojn tie, sed ni povus facile resti multe pli longe, ĉar estas tiom multe por malkovri pri Esperanto.



A chacun sa boule

Renée Triolle

Si la Provence a donné naissance à la pétanque, née à La Ciotat en 1903 pour qu'un champion, Jules Lenoir, puisse continuer à jouer alors qu'il souffrait de handicap, l'Anjou a lui aussi sa boule, la boule de fort, inventée par les soldats de Napoléon dans les fossés des Tuileries, qui jouaient avec les boulets de canon d'un kilo. C'est une boule asymétrique, avec un côté fort (l'autre côté a été coupé).

Ne nur en Bretonio, ĝis Saint-Nazaire, sed ankaŭ en la nordo oni ludas (la bourle) ĝin.

Post la metala globo, kiu pezas 1 kilogramon, oni uzas lignan, el gajako, arbo el Amazonio, kiu pezas inter 3 ĝis 8 kilogramojn. Sed ligno difektiĝas, oni do aldonas metalan cirkulon. Hodiaŭ la globoj pezas 1,350 kg, la diametro estas 99 mm, kaj la plimulto de la globoj estas el gumo.

La ludo estas trankvila, kvieta, por «inteligentaj» homoj ! Ĝi malfermis la Olimpiajn Ludojn en Aŭstralio en 2000. Tamen tiu ludo estis diskrimi-

nanta: virinoj estis akceptitaj nur en 1998, la lokaj kluboj baziĝis sur profesioj (laboristoj, entreprenistoj ludis en apartaj kluboj), religio ktp.

Oni ludas en 2 homaj teamoj, per du globoj, oni celas malgrandan blankan globon «la etulo» aŭ «la mastro». La ludejo, el plastaĵo estas dekliva, 19-23 metrojn longa, 5 metrojn larĝa. Celi la etulon estas malfacile ĉar pro la deklivo la vojo de la globo iĝas hazarda.

En Baŭgé estas 25 kluboj/societoj. La ludo iĝis monda heredaĵo far UNESKO. Vizito al ludejo okazis dum staĝo en Greziljono.



©Marie-Anne Guffond



Fratoj LUMIERE en Tours


Renée Triolle



La Esperanto-klubo de Tours festis sian 120jariĝon per semajna informado en la universitatoj, bibliotekoj ktp.

Mi estis invitita prelegi la 11an de oktobro pri «L'espéranto, langue dangereuse» surbaze de la franca traduko de la disertacio de germana historiisto, Ulrich Lins. Ĝi sin turnas al franclingva publiko, invitita de la biblioteko kaj kultura domo.

Dimanĉon, la 12an, la esperantistoj troviĝis en la restoracio apud la golfejo, kaj laŭ ilia peto, mi



prelegis, kun bildoj pri

Fratoj Lumière, kies unua filmo estas konata mondscale «Alveno de trajno en la stacidomon de La Ciotat».

Mi estis tre bone gastigata de la organizantino, Pierrette Formen, kiu, lunde vizitigis al ni la malnovan urbon Tours. Bonŝance estis belaj sunaj tagoj kaj la restado iĝis ankoraŭ pli agrabla.

Gratulojn!

Un stage studieux et convivial à La Garde

Les 22 et 23 novembre 2025, Espéranto-Provence a organisé son stage d'automne au domaine de Massacan, à La Garde (83). Dans ce cadre méditerranéen exceptionnel, avec parc arboré et accès direct à la plage de Magaud, les participantes et participants ont bénéficié de deux journées d'étude et d'échanges. Le beau temps frais a participé de l'enthousiasme de chacun, ainsi que l'accès à la plage même s'il n'y a eu qu'un baigneur parmi le groupe.



Trois niveaux étaient proposés : débutants avec **Renée Triolle**, intermédiaire avec **Jean-Pierre Cavelan**, et avancé avec **Pascal Vilain**. La qualité de l'enseignement et l'ambiance chaleureuse ont été unanimement saluées.

Les repas et les moments informels ont favorisé la convivialité, permettant à chacun de progresser tout en tissant des liens. Les retours recueillis soulignent l'excellente organisation du stage, l'atmosphère amicale qui a régné tout au long du week-end, et la richesse des interactions qu'il a permises. Plusieurs participantes et participants ont d'ores et déjà exprimé leur souhait de revenir lors d'une prochaine édition.

Plus d'infos : <https://provenco.esperanto-france.org>





Les espérantistes naturistes se distinguent à la compétition internationale de natation

Du 31 octobre au 2 novembre 2025, Sitges (Catalogne) a accueilli une édition record du Concours International Naturiste de Natation, réunissant près de 200 participants venus de toute l'Europe et au-delà. Des équipes de neuf pays, ainsi qu'INOE – Internacia Naturista Organizo Esperantista - ont contribué à une ambiance chaleureuse, sportive et résolument internationale. L'organisation, assurée par l'Associació Naturista de la Platja de l'Aiguadoç avec le soutien de la FEN (Fédération Espagnole de Naturisme) et de l'INF-FNI (Fédération Naturiste Internationale), a été unanimement saluée.

L'équipe INOE, forte de huit membres, a brillé grâce à plusieurs médailles : or pour Rozi et Dominike, deux d'argent pour Erik et une pour Dominike, bronze pour Yanik et Erik. Didje et Tjeri ont également vaillamment nagé, mais n'ont pas obtenu de médailles et tous ont été soutenus par Frida et Marko. On peut également noter le relais des nations 8x50 m brasse, où une équipe combinant Italie, Suisse et INOE réalisa le meilleur temps, même s'il ne fut pas classé, car étant trinational.

Il est important de souligner qu'une large partie de l'équipe INOE est constituée de membres d'Espéranto-France, et plus particulièrement d'Espéranto-Provence, renforçant encore les liens entre naturisme et mouvement espérantiste.

Plus d'infos : <https://www.esperanto-naturismo.org>

INTERKANT

gvidas provencano, Bernard Bigonnet

Interkant estas koruso, kiu kantas en Esperanto. La kantistoj antaŭler-
nas la kantojn hejme kaj trejnas dufoje jare, unu semajnon dum staĝo.



La lasta okazis en la kulturdomo Grezil-
jono en novembro, la posta okazos prin-
tempe. Interkant regalis nin dum vespero
la 27an de oktobro, invititaj estas pliaj
kantistoj, ĉefe viroj, do ne hezitu kontakti:
Bernard Bigonnet ĉe espero84@aol.com.
Ni antaŭĝojas aŭdi vin!

EXPOSITION : L'EURASIE EN VELO

Dans les années 30, un jeune ouvrier espérantiste, Lucien Péraire part en
vélo au Japon. Il fabrique à Moscou une béquille métallique pour pouvoir
circuler sur les rails du Transsibérien. Ses mémoires,
plus de 3000 pages en français, espéranto, sténo et
dessins ont été retravaillées par le CNRS. Une expo-
sition reprend ces documents : 9 + 5 panneaux de
60 cm x 42, faciles à accrocher sur des cimaises avec
des pinces à linge vous sont proposés gratuitement par
Espéranto-Provence. Vous pouvez certainement pré-
senter cette exposition à la bibliothèque de votre ville,
ou au CDI du lycée ou collège ou tout autre lieu public.



Ajoutons que les notes de Lucien sont aujourd'hui une mine de renseigne-
ments pour les chercheurs du Vietnam ou du Japon !

Facile à transporter dans un carton de 63 x 46 x 7, l'exposition vous est pro-
posée gratuitement par Espéranto-Provence. Merci de la réserver (avec
proposition de dates) auprès de triolle.renee@wanadoo.fr chez qui elle
est entreposée.

Guide (presque) sérieux de survie pour débutants espérantistes

*(ou comment dire "Saluton" avec assurance
et "Kion vi diris ?" avec dignité)*

Marc Gallardo

Bienvenue dans le monde merveilleux de l'espéranto — cette langue simple, logique et internationale... Il suffit qu'on ouvre la bouche et on fonce. Allez on se concentre.

Voici quelques conseils testés (et parfois ratés) pour survivre à vos premières conversations.

Quand vous ne comprenez rien (et cela arrivera, ne mentez pas), **souriez**.

Dites simplement : "Jes, jes, tre interese !"

Personne ne saura que vous n'avez rien compris, et vous passerez pour un esprit profondément méditatif.

Le mot "do" (alors, donc, du coup, enfin... bref, *do*) est votre meilleur ami.

Il s'insère partout : "Mi pensas ke... do... eble... jes."

Traduction libre : *Je n'ai aucune idée de ce que je dis, mais je m'intègre dans la conversation.*

Au premier congrès, vous serez entouré de gens parlant vingt langues.

Ne paniquez pas. Quand on vous demande :

“Ĉu vi parolas esperanton flue?”

Répondez avec assurance :

“Kompreneble!”

Puis renversez discrètement un peu de café sur vous pour changer de sujet. Si on n'est pas altruiste sur l'interlocuteur, ça peut pas rater pour abrégé.

L'espérantiste expérimenté reconnaît le faux débutant à son regard paniqué.

Solution : entraînez-vous à hocher la tête avec conviction, même si on parle de la grammaire du volapük, ou de la culture des petits pois en Mongolie au 15^e siècle (ça marche pour tout).

Petit bonus : dites “Bonege!” de temps en temps. Cela signifie “Super !” et ça fait toujours plaisir.

Ne chantez “*La Espero*” qu'après avoir vérifié que vous connaissez

au moins la moitié des mots.

Sinon, inventez : personne ne vérifie jamais vraiment les paroles.

Grâce à cette langue, vous rencontrerez des gens du monde entier.


Et vous découvrirez que “Mi amas vin” (je t'aime) se dit beaucoup plus facilement après un troisième verre de vin rouge.

Parlez, souriez, improvisez... et si tout échoue, dites simplement : “Mi estas komencanto.” (Je suis débutant.)

Tout le monde vous aimera quand même.

Facila krucvortenigmo

Marc Gallardo



- 1- Aro de frazoj aŭ laboro de la aktoroj
- 2- Trudi siajn kondiĉojn aŭ por bazklasoj
- 3- Malmoderna malnoviĝinta aŭ bezono de renovigo
- 4- Markas miron aŭ ofte aŭdata
- 5- Kio estas silento rilate al parolado
- 6- Rapida respondo aŭ ago kiu sekvas
- 7- Ĝi estas perfido laŭ la aŭtoroj
- 8- Necesas eviti dum niaj kunvenoj
- 9- Sento aŭ karakterizaĵo de turo
- 10- Interŝanĝi pri aferoj aŭ aliaj
- 11- Aviadilmotoro aŭ energiproduktanto



1- Teksto / 2- Dikti / 3- Kaduko / 4- Kion / 5- Oro / 6- Reaktivita
7- Traduki / 8- Krokodili / 9- Inklino / 10- Reaktoro / 11- Reaktivita

La recepto por farĉitaj ŝafidaj piedfingroj

Rosy Inaudi

Jen la tradicia Kristnaska recepto en Provenco. Ĝi estas tre simpla, sed la kuirtempo estas longa. Plej bone estas prepari ĉi tiun recepton la tagon antaŭe, ĉar ĝi gustas eĉ pli bone la sekvan tagon post revarmiĝo.

Ingrediencoj :

- 24 ŝafidaj piedfingroj (certigu, ke ili estas farĉitaj nur per ajlo, petroselo kaj peco da salita porkaĵo),
- 6 ĝis 8 piedfingroj,
- 1 bovida piedfingro,
- 400g da hakitaj tomatoj,
- 100g da tomata pasto,
- 3 karotoj, 2 cepoj, bukedo garni, 4 ajleroj, la ŝelo de unu oranĝo, 3 aŭ 4 birdokulaj kapsiketoj, 75cl (aŭ pli) da seka blanka vino, 1 ŝoto da konjako.



Preparado :

- 1 - Lavu kaj senŝeligu la karotojn. Tranĉu ilin en maldikajn tranĉaĵojn. Senŝeligu kaj tranĉu la cepojn. Senŝeligu kaj fajne haku la ajlon.
- 2 - En granda poto, sautéu la hakitan ajlon, cepojn kaj karotojn en olivoleo.
- 3 - Aldonu la piedojn, la bovidaĵon (tio densigos la saŭcon), poste aldonu la ŝinkokrurojn, tomatojn, tomatan paston, kapsiketojn, timianon, laŭrofolion kaj grandan strion de oranĝa ŝelo. Spicu per salo kaj pipro laŭguste.
- 4 - Kovru ĉion per blanka vino.
- 5 - Boligu malaltfajre dum almenaŭ 6 horoj. Kontrolu foje kaj kirlu por eviti algluiĝon. Aldonu iom da akvo se la saŭco tro reduktiĝas. Post 6 horoj, aldonu la konjakon. Bone boligu dum almenaŭ pliaj 2 horoj. Kompreneble, ideale vi lasus ĝin boleti la tutan tagon kaj servus ĉi tiun pladon la sekvan tagon, akompanate de vaporitaj terpomoj.

À noter sur votre agenda



Dans notre fédération

Plusieurs cafés linguistiques “esperanto” :

1^{er} jeudi de chaque mois - 18h - Marseille (13)

La Passerelle - 26 rue des Trois Mages (près du Cours Julien) - 6^{ème}

infos : *Thierry Spanjaard - 06 09 18 28 51*

Dernier jeudi de chaque mois - 17h - Lorgues (83)

“Carnets de voyage” - 12 avenue Allongue (rue face à la mairie)

infos : *Jean-François Cousineau - 06 82 53 52 02*

8 janvier 2026 à 18h - Marseille (13) : Courts-métrages en Espéranto

Vidéodrome 2 - 49 Cours Julien - 6^{ème}

infos : *Thierry Spanjaard - 06 09 18 28 51*

13 janvier 2026 de 17h à 19h - Marseille (13) : Gâteau des rois

CIRA - 50 rue Consolat - 1^{ère}

14-21 mars 2026 - Les Issambres (83) : Mediteranea Esperanto-Semajno

Hotelo Miléade - Les Issambres - Francio

infos : *Thierry Spanjaard - 06 09 18 28 51*

14-17 mai 2026 - Méjannes-le-Clap (30) - INOE : Fin de semaine naturiste

Route de la Genèse - 30430 Méjannes-le-Clap

En France

Pour les séjours à Grésillon ou Kvinpetalo, voir les sites respectifs

Baugé (49) - Château de Grésillon

<http://gresillon.org/?lang=fr>

Bouresse (86) - Kvinpetalo

<http://www.kvinpetalo.org>

22-25 mai 2026 - Hérouvillle Saint-Clair (14) : Congrès d’Espéranto France

<https://kongreso2026.esperanto-france.org>

kongreso2026@esperanto-france.org

Ailleurs en Europe et dans le monde

01-08 août - Graz (Autriche) : 111^e Congrès mondial d’Espéranto

<https://uk.esperanto.net/2026/>

**Ĝeneralan Kunvenon de Esperanto Provence
la 15-an de marto en Les Issambres.**